**Protokolo de la 56a senatkunsido** (la 50-a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 59-a post la fakta eklaboro) okazinta en Treviro (Trier, DE) dum IF 22.
Kunsidtempo: Sabato, 2005-12-31, 9:40–10:10

*1) Formalaĵoj.* Ĉeestas senatanoj Fössmeier, Frank kaj Quednau, kaj vicsenatano Poláková. La senato estas kvoruma kaj decidas la tagordon evidentiĝantan el tiu ĉi protokolo. La kunsidon gvidas prezidanto Frank; la protokolon skribas sekretario Fössmeier.

*2) Kontrakto pri AIS-IKU.* La senato unuanime akceptas la novan kontrakton kun UEA pri Internacia Kongresa Universitato, subskribitan en Vilno.

*3) Kulturparlamento.* La senato unuanime akceptas inviton de Eŭropa Klubo partopreni en eksperimenta „parlamento pri kulturo kaj lingvoj".

*4) Propono Holdgrün.* Ĉar OProf. Holdgrün ne plenumis sian proponon akceptitan de AIS dum SUS 28 (kiu inkluzivis redonon de posedaĵoj de AIS), AIS nuligas sian akcepton kaj dekalkulos la valoron de la uzita komputilsistemo je 2004-01-01, inkluzive de 2-procenta interezo, de lia servobonhavo.

Treviro, 2005-12-31
*OProf. Dr. habil. H. Frank, prezidanto*
*OProf. Dr. R. Fössmeier, protokolofico*